


Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 6, Junio, 2007


# Lou Silver HARRISON

*Karlo Offutt*



Lou Harrison, usona komponisto kaj Esperantisto, naskiĝis en Portlando (Oregono) la 14-an de majo, 1917, kaj mortis en Lafayette (Indianao) je la 2003. Harrison estas aparte rimarkita por enmetado de elementoj de la muziko de ne-okcidentaj kulturoj en liajn komponaĵojn. Li uzis muzikilojn kiuj estis faritaj el stanaj skatoloj kaj aliaj materialoj. La plejparto de liaj komponaĵoj estis skribitaj per naturala gamo anstataŭ egaltemperamenta gamo. Harrison estas unu el la plej precipaj komponistoj kiuj verkis kun mikro-tonoj.

Kiam li estis infano, la familio translokiĝis en Kalifornion, loĝante pli-malpli ĉiujare en nova urbo. Tie li estis interesita je diversaj disponeblaj kulturoj, Kantona opero, Gregoria ĉanto, hispana kaj meksika muziko, ĵazo, amerika indiĝena muziko. Lin multe influis azia (precipe indonezia gamelana) muziko, kaj li komponis por indoneziaj instrumentoj kaj por porokazaj aŭ hazardaj instrumentoj (ekzemple aŭto-bremsiloj).



S-ro Harrison estis malkaŝema pri siaj politikaj opinioj, kiel pacifismo, kaj pri sia samseksamado. Li estis politike agema kaj sufiĉe bone edukita pri la historio de geja movado. Li komponis muzikon por multaj politikaj verkoj (tekstoj), ekz. “Omaĝon al Pacifikaĵo”, dediĉita al la inaŭguro de la Berkley Stabejo de Pacifik-fonduso. Iam Portlanda Vir-gej-koruso kaj Sietla Vir-koruso komisiis al li siajn striktajn kantojn, originale por ok baritonoj (entute por 120 vir-kantantoj). Pri s-ro L. Harrison oni diras, ke samseksamado estas pozitiva (por li). Li fieris esti geja komponisto. Lia virineco aperis en lia konscio de estado. Sed, en la sama tempo, Lou estis tre vira, ankaŭ vigla feroce kaj asertema, ritmema, pulsema kaj agresema.

Pro la manko de enspezo fare de lia komponado, li laboris kiel floristo, best-flegisto kaj fajrobrigadisto. Je 1943, Lou transloĝiĝis al la urbo Novjorko, kie li laboris kiel muzika kritikisto. Tie li renkontis Charles Ives kaj atentigis la muzikan mondon pri tiu artisto. Li ankaŭ promociis la muzikon de aliaj usonaj komponistoj inkluzive Edgard Varèse, Carl Ruggles kaj Alan Hovhaness. Poste li instruis ĉe Nigra-Monta Kolegio. Je 1947, li suferis nervozan paneon kaj transloĝiĝis reen al Kalifornio.

Li estis Esperantisto, kaj donis esperantajn titolojn kaj tekstojn al pluraj siaj verkoj, interalie La Koro Sutro (1973; havebla en KD en E-societa biblioteko). Respondante al ĵurnalistaj demandoj pri IL, li diris, ke Esperanto estas lingvo, kiu plaĉas al li kaj kiun li ŝatas. Li ankaŭ multe utiligis e-mansignojn post la kor-operacio por la komunikado kun surdaj amikoj. Lia La Koro-Sutro estas, fakte, la medito pri kaj pro la koro (eble pro lia kor-operacio). “Sutro” estas parolado de Budho (aŭ instruo) pri la Veda sankta skribo. La Koro-Sutro estas la esenco de la Saĝo-perfektaj Skribaĵoj (de la I-a jc a.K.), praktikanta je Mahajana Budhismo. Ĝi aludas pri la koro de lia saĝo. 15-minuta peco, titolita Diversigita Terceto de piano, gongo kaj vibrafono, ankaŭ por rizaj manĝ-bastonetoj perfekte transdonas la etoson de Indonezio. Pro tio liaj verkoj estas pristudataj en muzikakademioj de Indonezio (Azio), Ameriko kaj aliloke.

Lou Harrison ricevis plurajn premiojn: Guggenheim, Rockfeller Fellowships ktp. Li montris sin kiel unu el la plej originalaj kaj gravaj usonaj komponistoj de XX jarcento.

## Anoncoj de la estraro (kaj ne nur)

■ Estas renovigataj niaj tradiciaj E-piknikoj! Ĉi jare sian korton por ni afable disponigas gesinjoroj Roberto kaj Sepideh. Ni ĝuos E-etoson la 24an de Junio (dimanĉo) inter tagmezo kaj 7.00 ptm laŭ adreso: 1315 Jeanette St., Des Plaines, IL 60018, tel. (847) 297-1976. Bonvolu preni manĝaĵojn kaj trinkaĵojn laŭ via plaĉo kaj gusto.



■ Estraro de E-societo de Ŝikago decidis finance helpi al s-ino Tina Seastrom per $100.00 por studi Esperanton en San-Francisko. Pri ŝia sperto ni aŭskultos Septembre.

■ La NordPacifika Regiona Esperanto-Konferenco por Ameriko (NOREK) okazos inter la 21-a kaj 23-a de septembro 2007 en la vilaĝo Sidney apud la urbo, Viktorio, la ĉefurbo de la Kanada provinco, Brita Kolumbio. Informojn kaj aliĝilojn petu de: esperanto@shaw.ca aŭ skribu al: Wally du Temple, 765 Braemar Avenue, NorthSaanich, B.C., Canada, V8L 5G5.

■ 1715 kongresanoj el 57 landoj aliĝis al la 92-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Jokohamo. Iom pli ol duono (904) venas el la gastigonta lando. Francio (91) ŝajnas jam certigi la duan lokon en la statistiko, ankaŭ Korea Respubliko (85). En sia aprila kunsido la Estraro de UEA elektis la prelegojn de la Internacia Kongresa Universitato en la Jokohama UK. La decido estis farita subaze de la profesia pritakso de la Komisiono pri IKU kunordigita de prof. Christer Kiselman. La Komisiono taksis la prelegproponojn laux du kriterioj: fakeco, t.e. kiom kvalifikita estas la preleganto por la temo, kaj populareco, t.e. kiom interesa kaj alloga estas la proponita temo por la kongresanoj.

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
92a UK
JOKOHAMO
4-11 de aŭgusto
2007

■ La n-ro 78 (majo 2007) de la revuo Etnismo, informilo pri etnaj problemoj, kiun eldonas Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL), fak-asocio de UEA, pledanta por la rajtoj de la etnaj minoritatoj, nun legeblas enrete: http://www.geocitie s.com/ikeldv/ Etnismo.html>http://www.geocitie s.com/ikeldv/ Etnismo.html
El la enhavo: la minoritataj lingvoj de Italio; novaĵoj el Eŭskio; perspektivoj de la frisa. Istvan Ertl, estrarano de IKEL

### Adreso (provizora)


Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/


### Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; $40 jare;
Familia membro : $30, Regula: $20
Studenta aŭ pensiula: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

### KUNVENOJ

**okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:**

**Sulzer Public Library**, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

24an de Junio (dimanĉo)– pikniko sur la korto de Roberto kaj Sepideh

24an de Julio – K. Offutt kaj V. Pajuk informos pri la instrua Zagreba metodo, demonstrante E-filmon "Gerda malaperis"

28an de Aŭgusto – Roberto kaj Sepideh rakontos pri la lasta UK en Jokohamo

